

Renkontiĝo en Mont-Soleil kaj Jacques Mühlethaler, 3-a parto
Claude Gacond, 114-a radioprelego, 1965.12.08 & 1965.12.11

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond.

« La instruado de la civitismo dependas de la lernejo, de tiu lernejo, kiu dum jarcentoj apartenis al la religioj, poste al la ŝtatoj, kiuj tro ofte uzas tiun instruadon por propraj egoismaj celoj. La instruado de la civitismo apartenas hodiaŭ al la lernejo de la Homoj, al la lernejo de la Vivo, al la lernejo de la Paco, al la lernejo Edukilo al konkordo kaj kooperado interpopola... »

Jen kiel parolas Jacques Mühlethaler al siaj amikoj dum pasiaj diskutadoj. Li gestadas. Liaj okuloj spegulas internan fajron. Kun li la vesperoj tro rapidas. Estas interese. Oni povas jesi liajn dirojn. Sed ĉu li estas tute normala ? Ĉu lia deziro forlasi sian firmaan direktadon ne estas indiko de malekvilibro ? Ĉu li ne tro parolas ? Aŭskultu : *« Estas fine la momento vidi vekigi en la homo, ĉu li estas politikisto aŭ simpla civitano, la senton pri propra responsecio por ĉio, kio favoras la konstruon de la morgaŭa mondo, por ĉio, kio tuŝas al la Paco, por ĉio, kio donos administran strukturon al la mondo. »*

Li certe pravas, pensas la aŭdantaro. Sed ĉu li ne estas Don Kihoto ekbatalonta kontraŭ muelejoj ?

La interna alvoko ĉiam pli laŭtas. Malgraŭ la mokoj Jacques Mühlethaler pretigas sian forveturon.

- Kien vi volas iri prediki, apostolo Jakobo ?

- Mi ne ankoraŭ ekzakte scias. Eble en Turkujo!

Estas strange, kiel normalulo subite povas fariĝi strangulo. Kredi sin vokata por misio, voli prediki sian utopion en fora lando.

- Bonan vojaĝon, krucisto !

Fine ĉio estas preta. Du malpezaj valizoj ebligas facilan translokadon. Johano, lia frato, veninta el Parizo kaj sinjorino Ludi, lia sekretariino, akompanas lin ĝis la ĝeneva stacidomo. Forira malĝojo. Espero.

En la haveno de Marsejlo nia stranga vojaĝanto serĉas danan ŝipposedanton, kies adreson donis amikoj. Li trovas tiun sinjoron Peterson, homo tre simpatia. Li predikas al li sian idealon kaj ricevas por malalta pago bileton al Istanbul sur la komerca ŝipo Alcyone. De tiu komprenema ŝipisto Jacques Mühlethaler ricevis la taŭgan kaj necesan kuraĝigan helpon.

Je la mateno de la 8-a de aprilo 1959 li kisas la gepatrojn, kiuj loĝas en Sanary, ĉarma marloko inter Toulon kaj Marsejlo. La granda aventuro komenciĝas.

Sur la ŝipo Jacques la idealisto estas apogita kontraŭ la pavezo. Li admiras la koleregan maron. Liaj pensoj flugas al la nova tasko : *« La tero svenis. Mi estas sola kun, profunde en mia koro, idealo, kiu lumigas mian nokton. Tamen mi estas sola. Dum mia vojaĝo mi devos kutimiĝi al tiu soleco. Mi devos kutimiĝi tiri plugilon, kiu plugos nevideblan teron, semi en la eteron, paroli, multe paroli al alilingvuloj. Mi devos trovi la rimedon por komprenigi min. Eĉ se ili emas resti surdaj, ili devos aŭdi... Estos belega rekompenco ! Grandegas la espero ! »*

Tiun belan revon subite ĉesigas forta ondo. La ferdeko malaperas sub ŝaŭma inundo. La ventego furiozas. La revemulo malaperas en sian kajuton. Tie li pensas al la kuraĝa Alfred Bombard kaj meditas la heroismon de tiu kuracisto. *« La plej eksterordinara kaj kuraĝa eksperimento de la jarcento »*, li konkludas.

Renkontiĝo en Mont-Soleil kaj Jacques Mühlethaler, 3-a parto

Claude Gacond, 114-a radioprelego, 1965.12.08 & 1965.12.11

« La ŝipo rulas, tangas kaj ĝemas. Antaŭdorma sonĝo min mirigas, revo belega, kie hieraŭaj infanoj hodiaŭ homiĝis por formi senliman rondon ĉirkaŭteran... Kaj ili kantas je sia maniero la grandiozan poemon de Paul Fort. Ĉiuj homoj en la mondo fine premas al si la manon... »

La vekiĝo sub malvarmega duŝo. Neŝlosita lukso malfermis la vojon al ondego, kiu sen honto vizitis la kajuton kaj vekis la revemulon al la realaĵoj. Li devas eltiri sin el lito fariĝinta banujo. Tio ne facilas pro la movoj de la ŝipo. Spongi tiun malagrablan akvon estis tre reala elreviĝo !

Tiel komenciĝis la pilgrimo de Jacques Mühlethaler.

Vi aŭdis Radio-Svislandon per la voĉo de Claude Gacond, kiu diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-